

El la Originalo de Miyazawa-Kenzi

# GAUCHE LA 'CELISTO





200 / 83

*Scenaro de K. Kuroda  
K. 1957*

*Kolorfilmo de Pupa Teatro*

# GAUCHE LA 'CELISTO

(En Kvin Bobenoj)

SCENARIO

PRODUKTIS

Mitui Arto-Produkcio



**JAPANA ESPERANTA LIBROKOOPERATIVO**

Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku,  
Osaka, Japanio.






82-2

821,520-2-912

Ĉiuj rajtoj rezervitaj







## Stabo de Produktado

|                                |                                    |
|--------------------------------|------------------------------------|
| Produktado                     | ATUKI-TAKA                         |
| Originalo                      | MIYAZAWA-KENZI                     |
| Scenario                       | TANAKA-SUMIE<br>KAWAZIRI-TAIZI     |
| Reĝisorado                     | MORINAGA-KENZIRÔ<br>KAWAZIRI-TAIZI |
| Fotado                         | KAKITA-ISAMU                       |
| Iluminado                      | IZUMI-SEIZÔ                        |
| Reĝisorado pri koloroj         | KOBAYASI-YUKIO                     |
| Belartoj                       |                                    |
| Pupoj                          | „PUK“, La PUPA KLUBO               |
| Arkitekturo                    | „PUK“, La PUPA KLUBO               |
| Muziko                         | IHUKUBE-AKIRA                      |
| Direktado pri ĝeneralaj aferoj | UENO-TAIGO                         |
| Traduko                        | NOZIMA-YASUTARÔ                    |



Ĉe la fino de iu malgranda urbo en Nordorienta Distrikto de Japanio, apud rivereto kiu fluas malrapide ĉirkaŭ monteto, staras malnova akvomuelila kabano. Ĝi estas la loĝejo de Gauche.

Estas frusomero, kiam la spikaroj de fortikaj tritikoj ŝancelas sin ondante, kaj la verdo de la poploj briletas reĵetante la sunlumon —

Gauche estas la 'ĉelisto de la Orkestro Ora Stelo. Li mem ludas ĉiam plenstreĉe, sed la Direktisto de la Orkestro riproĉas lin ĉiufoje, dirante aŭ „Vi ludas kvaŭ malstreĉita ŝulaĉo“, aŭ „Ĉu ni devus rekomenci la ekzercon ankoraŭfoje de do-re-mi-fa-sol?“

La Orkestro Ora Stelo esperis prezenti „Pastoralon“, la Sesan Simfonion de Beethoven en la okazo de ĝia publika koncerto, kiu okazos post deko da tagoj. Vespere ili ludis akompane por la prezentado de magiistoj en la kinejo de la urbo, kaj dum la tago ili luis la ejon kaj ekzercis sin. La Direktoro Sovagkato de la kinejo opiniis, ke neniu eniros, kion ludus tia kampula orkestro, kia la Orkestro Ora Stelo. Li ludonis la kinejon al vulgara Jaz-orkestro, kaj forpelis la Orkestron Ora Stelo. La membroj nun ne havis alian rimedon ol ekzerci la ludadon de la Pastoralo en la stalo.

Gauche daŭrigis sian ekzercadon per ĉiuj fortoj,

ankoraŭ post kiam li revenis malfrue en la nokto al sia muelila kabano. Lian 'ĉelon aŭskultis la animaloj. Laŭ konsilo de la Sciuro la Talpo eniris sub la plankon de la kabano por kuraci sin de reŭmatismo. La Kato venis al li aŭskulti lian 'ĉelon. Venis ankaŭ la Kukolo por peti instruon pri do-re-mi-fa-sol, kaj diris al Gauche, kiam li plendis pro la ĝeno, ke inter ŝiaj kolegoj neniu ĉesas ekzerci ĝis la gorgo eksangas. Dum li ludis la sekvintan vesperon la muzikon „Gaja Kaleŝisto“ por la Melido kiu ĝin alportis, li estis rimarkigita de li: „Strange, ke via dua kordo ĉiam malfruiĝas.“

Tamen, se li ĉeestis la ekzercon, li estis riproĉata ĉiam same de la Direktisto, kaj li preskaŭ senkuraĝiĝis. Sed en iu nokto uragana, la Muso-patrino kaj la -infano, kiuj venis al li, montris, ke lia 'ĉelo havas kapablon varmigi la korpon de la animaloj en la ĉirkaŭo kaj kuraci ilin de malsanoj. Kaj tiel li estis kuraĝigita.

Fine venis la tago de la koncerto — La „Pastoralo“ de la Orkestro Ora Stelo estis akceptata kun tondra aplaŭdado. La Direktisto estis surprizita de la progreso de Gauche. Kiam oni postulis bisajon, li ŝovis Gauche sur la scenejon. Li ludis „Tigroĉasado en Hindio“ komponitan de li mem. Arda aplaŭdo ĉirkaŭprenis lin.

Li nun ankoraŭ refoje rememoris pri la animaloj kiuj vizitis al li.



## PERSONOJ

GAUCHE

KNABINO

DIREKTISTO DE LA ORKESTRO

DIREKTORO SOVAĜKATO

JAZISTO

FLUTISTO, KAJ ALIAJ MUZIKISTOJ

DANCISTINOJ DE LA REVUO

RIGARDANTOJ

LEPORO

TALPO

STRIGO

KATO

KUKOLO

SCIURO-PATRINO

SCIURO-INFANO

MUSO-PATRINO

MUSO-INFANO

MELIDO

PASERO A

PASERO B

Gauche : elparolu Gooŝ.

— Heliĝas grade —

Scenejo de la Pupa Teatro kaj la partero.

Muziko — Kanto de kurtenleviĝo

„Produktis Mitui Arto-Produkcio“

„Miyazawa-Kenzi : Gauche la Ĉelisto“

(1) Post la kurteno.

La pupoj vicigas sin interpreme sur la tuta scenejo.

Venas du ludantoj, kaj almetas la pupojn al siaj manoj, unu de la Leporo kaj la alia de la Talpo.

Eksonas la tamtamo, kaj la lumigiloj eklumas Leviĝas la Unua Ĉapitro de la Pastoralo de Beethoven.

(2) Sur la scenejo.

Senbrue la kurtenoj estas tirataj ambaŭflanken. Lumoplena pejzaĝo de kampvilaĝoj. Monto Iwateyama staras malproksime en nebuleto. Dense kreskantaj arboj de arbaro. Kampoj de fortikaj tritikoj. Poploj apud monteto vestas sin per junaj folioj briletantaj; sur betuloj blankaj floroj. Konvaloj disvastigas en la aero tintantajn sonojn de siaj sonoriletoj. Rivereto malrapide ĉirkaŭanta la malsupron de monteto.



Staras malnova akvomuelila kabano — ĝia rado ne funkcias. La Leporo venas dance saltante.

*Leporo:* Ho agrable, estas freŝe! La vento blovas, la ĉielo brilas lumege . . . .

La Talpo levŝveligas la teron kaj montras sin.

La Leporo surpriziĝas.

*Talpo:* Ha, vi Leporo . . . . Vi estas tiel vigla!

Ĉu via neŭralgio estas jam bona?

*Leporo:* Ho jes! Ĝi ja estas bona!

*Talpo:* Ĉu vi trovis efikan medikamenton?

*Leporo:* Ho jes! Mi ja trovis ĝin!

*Talpo:* Diru al mi ankaŭ, mi petas, kie vi trovis ĝin!

*Leporo:* . . . . Vidu, jen! Tie staras la muelilkabano de s-ro Gauche. La bonega medikamento troviĝas tie.

*Talpo:* Ha? (Rigardas returnen.)

(3) Fora perspektivo al la muelila kabano.

Vidiĝas la Knabino veturanta per biciklo laŭ kampa vojo, kiu venas de malantaŭ la monteto.

(4) Ekstere de la muelila kabano.

Verda tomatokampo sur la tuta ĉirkaŭo antaŭ la kabano.

La Knabino venas kun sako metita sur la biciklo, kaj haltas. Trovinte la muelradon ne funkcia, ŝi klinas la kapon.

*Knabino:* Hej Gauche! Sinjoro Gauche!

(5) En la muelila kabano.

La luno eniranta tra la fenestro fluas de la muroj sur la plankon, kaj la lumo penetranta tra fendoj de la kabano lasas striojn sur la pistiloj kaj la tablo.

Gauche ludas la 'ĉelon absorbite.

En la kabano, ĝian plejparton okupas pistiloj starantaj en vico kaj grandaj lignaj dentoradoj. En angulo, lito, tablo, seĝo, ĉiuj kun naiveco de manlaboraĵo. Pendas lampo de la trabo senplafona. La Knabino malfermas la pordon senbrue kaj eniras.

*Knabino:* Bonan vesperon, sinjoro! Ĉu la faruno ne estas ankoraŭ preta?

Li surpriziĝas, ĉesas ludi, kaj skuas la kapon.

*Knabino:* Estas embarase! Ĉiam vi nur ludas la 'ĉelon . . . .

*Gauche:* Pardonu min!

*Knabino:* Kiam ĝi estos preta?

*Gauche:* Hm, jes . . . . (Li klinas la kapon.)



*Knabino* : Do, mi venos ankoraŭfoje, kiam la tomatoj estos ruĝaj. Nur la sakon mi lasas ĉe vi. Do, adiaŭ, ĝis la revido !

(Foriras.)

Li prenas la ĉelon refoje.

— Malheliĝas grade —

— H. G. —

(6) Ĉe la urbo.

La urbo ĉe montomalsupro. Viciĝas domovicoj.  
Fore vidiĝas la pinto de la publika kunvenejo  
kaj la turo de fajrogardo.

Du paseroj starantaj sur telegrafa drato.

Malantaŭ la kinejo, apogitaj estas malnovaj  
elpendaĵoj por filmoj.

Simfonio Pastoralo elfluanta de la kuliso.

Tra la fenestro vidiĝas la Orkestro Ora Stelo  
ekzercanta.

(7) En la kuliso.

La Orkestro Ora Stelo ekzercas sin.

La Sesa Simfonio.

La trumpeto kantas per ĉiuj fortoj.

La klarneto helpas ĝin plene.

En du manieroj la violonoj siblas kvazaŭ vento.

Ankaŭ Gauche ludas plenstreĉe, fikse rigardante  
en la muziknoton, kun la buŝo rezolute fer-  
mita kaj la okuloj malfermegitaj kvazaŭ du  
pladoj metitaj unu apud alia.

(8) Telegrafa fosto ekster la kinejo.

La du paseroj aŭskultas entuziasme.

Subite la muziko haltas. Surprizite la paseroj  
rigardas sin unu al la alia.

(9) En la kuliso.

La membroj ĉesis la muzikon, regas silento.

Kriegas la Direktisto.

*Direktisto* : (Kuraĝigante,) Ne, ne, ne . . . . !

Ĉu vi komprenas, amikoj, ke ĝis la venonta Granda  
Koncerto ni nepre fariĝu pli lertaj kaj konsternu  
tiun Direktoron Sovagkaton? . . . . *Tu-tet-tet-ti*,  
ankoraŭfoje de ĉi tie, nun ek' !

Ili rekomencas de iom antaŭ la ĵus ludita parto.

Gauche, kun ruĝega vizaĝo, ŝvitante sur la  
frunto.

(10) En la kontoro de la kinejo.

Interparolas la Direktoro Sovagkato kaj la  
Jazisto veninta de la urbego.



*Ĵazisto*: Sinjoro Direktoro, kio, al la diablo, estas la muziko?

*Sovaĝkato*: La . . . . la Sesa Simfonio, laŭdire, de Bebetoven!

*Ĵazisto*: (Ekstaras kaj komencas ĉirkaŭpaŝi kun afektema pozo.) Oho! La Sesan Simfonion de Beethoven en tia kamparo! Hm!

*Sovagkato*: Ho jes, pro tio ankaŭ mi ja estas tute embarasita. Se ili nur akompanus la prezentadon de skermado kaj jonglado, kaj nenion alian! (La muziko haltas en la momento.) Jen! Refoje la ĉiama misludo!

*Ĵazisto*: (Mokridas.) Ha' ha' ha' ha' . . . .!

(11) En la kuliso.

*Direktisto*: 'Ĉelo! Ne akordas viaj kordoj!

Konfuzite li agordas la kordojn.

Bedaŭrante por li en la koro, ĉiuj intence aŭ rigardas en sian muziknoton, aŭ fingrofrapetas sian instrumenton. Lia 'ĉelo estas malbona 'ĉelo. Li reĝustigas la kordojn per ĉiuj fortoj.

La 'ĉelo eligas knarantan sonon.

*Direktisto*: (Incitiĝante,) Gauche! Dum vi ne lertigos, ni estos ĉiam primokataj de la Direktoro Sovagkato.

Ni finu nun la hodiaŭan ekzercon!

La Direktisto fermas la partituron kun bruo, kaj eliras el la ĉambro.

La membroj stariĝas.

Gauche klinas la kapon profunde.

La flutisto metas la manon kompateme sur lia ŝultro.

— Miksiĝas —

(12) Kampa vojo en la nokto.

Li reiras hejmen kun pezaj paŝoj, kun la kesto de la 'ĉelo sub la brako. Novluno pendas ĉe la supro de poplo.

La Strigo sidas senmove sur branĉo.

(13) Ĉe la kluzo de la rivereto.

La Kato malfermas la kluzon rigardante al la kabano de Gauche. La muelrado komencas turniĝi.

(14) Ekstere de la muelila kabano.

La Kato deŝiras la tomatojn diligente kaj metas ilin en la korbon. La fruktoj estas ankoraŭ duonverdaj.

Li fajfas mistone la melodion de la Sesa Simfonio.



(15) Interne de la muelila kabano.

Gauche ekzercas sin plenstreĉe. Kun la vizaĝo ruĝega kaj la okuloj sangstriaĵ, li mienas terure minace, kaj estas preskaŭ tuj falonta.

La Kato eniras senbrue, kaj metas la korbon penegge sur la planko.

*Kato*: Ja penega estas la transporto! (Kiam li metas sur la plankon, la tomatoj ekruliĝas dise.)

Gauche, rimarkinte la tomatojn, kiuj alruliĝis ĉe liaj piedoj, turnas sin al la Kato.

*Kato*: Jen mia donaco al vi! Bonvolu manĝi!

*Gauche*: (Rimarkinte ke ili estas la tomatoj de lia propra kampo,) Ĉu ne estas miaj tomatoj? Kiu petis vin alporti ilin? Estas senrezono, ĉu ne, deŝiri ilin eĉ ne ruĝajn? Ho, ve, ili ja portus la plej ruĝajn fruktojn!

*Kato*: (Kurbigante la ŝultrojn, mallarĝigante la okulojn, kaj kun ridetaĉo ĉirkaŭ la buŝo,) Ho, sinjoro! Efikus malbone al via sano, se vi tiel ofendiĝas! Mi konsilas al vi, prefere ludu *Tromelaj* de Schuman. Mi aŭskultos ĝin por vi!

*Gauche*: Ne diru arogantaĵojn, vi nura kato!

*Kato*: (Ne delogite de lia kolero,) Ne, vi tute ne bezonas esti sindetenema. Mi nur petas vin. Por la muziko, nepre necesa estas la aŭskultanto.

*Gauche*: Aroganta! Aroganta! Aroganta!

*Kato*: (Afektante trankvilon,) *Tromelaj* komponitan de *Romantik Schuman*!

*Gauche*: Bone! (Kun mieno de decidiĝo li ŝlosas la pordon, fermas ĉiujn fenestrojn de la ĉambro. Li elprenas la ĉelon, kaj estingas la lampon. Envenas la lumo de la luno pasinta la dudekan tagon.)

*Kato*: Ho, ho! Estas ja alloga atmosfero!

*Gauche*: Ĉu tia estas via *Tromelaj*?

Li ludas unue *Träumelei*, kaj survoje kun ŝtorma vigleco ekludas la muzikon „Tigroĉasado en Hindio“.

(16) En la kabano.

La Kato surpriziĝas, suprensaltas palpebrumante, ĵetas sin al la pordo, puŝiĝas kontraŭ ĝin — ĝi ne malfermiĝas. Li rigardas al Gauche gestante: Ho ve!

La ĉelo intensiĝas pli kaj pli. Fajreroj ŝprucas el liaj lipharoj. Li suferas pro tikliĝo, kaj ternas. Rigardante tion, amuziĝante li ludas eĉ pli intense.

*Kato*: (Jam ne tolerante,) Ho Gauche! Ĉu ĝi estas *Tromelaj*?

*Gauche*: Ĝi estas „Tigroĉasado en Hindio“. Mi mem faris ĝin!



*Kato*: Jam sufiĉas! Mi petegas vin! Bonvolu ĉesi . . . . Mi ne arogantos plu . . . . Hu . . . . ha . . . .

*Gauche*: Ĝene! Mi nun tuj kaptos la tigron!

La ĉelo ankoraŭ pli intensiĝas. Li batas la takton intense per siaj piedoj.

La Kato ĵetas sian korpon kontraŭ la muron, kaj puŝiĝas kontraŭ la dentoradon de la mue-lilo. Ĉar li puŝiĝis kontraŭ la dentoradon, la ŝtona pistujo komencas turniĝi, kaj la pistiloj leviĝas.

(17) Sub la planko de la kabano de Gauche.

Vekiĝas la Talpoj kiuj dormis tie, kaj rigardis supren al la planko surprizite. Ĉiufoje kiam la pistiloj falas, pro la tremo saltas iliaj korpoj.

(18) En la muelila kabano.

La Kato ĉirkaŭkuras spiregante penege.

*Kato*: Helpu min, sinjoro! . . . . Sinjoro Gauche! . . . . Mi petegas vin!

Li daŭrigas plu la ludadon intense.

La Kato rondkuras kvazaŭ ventorado.

Li puŝiĝas kontraŭ la korbon, kaj la tomatoj disruliĝas sur la tuta planko.

(19) Ekstere de la kabano.

La Sciuroj, la Strigoj, ĉiuj vekiĝas, surpriziĝas kaj ronde turnas la okulojn.

(20) En la muelila kabano.

La Kato kuŝanta elĉerpita, jam ne povante moviĝi.

*Gauche*: (Kun cigaredo ĉe la buŝo, donante fajron al ĝi,) Kiel do nun? . . . . Ĉu vi jam submetiĝis?

*Kato*: (Afektante viglecon,) Ne tiel gravas!

*Gauche*: Montru al mi vian langon!

La Kato elmetas sian longan langon tuj abrupte. En la buŝon Gauche alblovas la fumon de tabako. Sufokite de la fumo, la Kato suprensaltas.

Li alsaltas al la pordo kaj puŝiĝas.


Ridante Gauche elblovas la fumon kun profunda spiro.

*Gauche*: Mi lasos vin tuj!

Malrapide li iras al la pordo, malŝlosas kaj malfermas ĝin. La Kato eliras rapidege kvazaŭ forblovanta vento.

*Gauche*: Ha' ha' ha' . . . . Ne venu plu!

—M. G.—





—H. G.—

(21) Kampa vojo.

Serene hele sur la tuta firmamento —

Terkulturistoj plugas la teron sur la kampoj.

Kovras la Dua Ĉapitro de la Pastoral Simfonio.

Bonhumore, fajfante melodion, Gauche iras portante sub la brakoj la grandan nigran keston de la 'ĉelo kaj la sakon de faruno.

La Knabino venas pelante kapron surdorse ŝarĝitan per abundo da cirsifloroj. Li renkontas la Knabinon, donas la sakon de faruno.

La Knabino ĝojplene ricevas ĝin kaj donas la florojn al li. Li ricevas ilin kun ĝojo.

Ili apartiĝas kaj foriras.

(22) En la kuliso.

La Orkestro Ora Stelo ekzercas sin.

Vidiĝas la cirsifloroj metitaj en florvazo.

(23) Ĉe la enirejo de la kuliso.

La Direktoro Sovaĝkato kaj la Jazisto malfermas la pordon kaj enrigardas.

(24) En la kuliso.

Ĉiuj ekzercas sin per ĉiuj fortoj.

Ankaŭ Gauche estas plenstreĉa kun la buŝo kurbigita.

*Direktisto*: (*Frap!* li kunfrapas la manojn refoje kun gesto kvazaŭ minaci. Gauche sentas ekpuŝon ĉe la koro.)

Fluto! (La Flutisto klinas sian kapon. Gauche intence proksimigas siajn okulojn al la muziknoto afektante pensadi, ĝuste same kiel ĉiuj faris pri li hieraŭ.)

*Direktisto*: De la ĵus antaŭa taktaro. Nun, ek'!

La Direktisto forte piedfrapas kun ekbruo, kaj ekkrias. La florvazo renversigas, la floroj falas sur la plankon.

*Direktisto*: Ne, ne, ne! Senhelpe fuŝa! Ĉi tie estas la koro de la tuta muziko, kaj tamen estas tiel maldelikata . . . .

La Direktoro, mi diras al vi, intencas prezenti revuon el Tokio anstataŭ nin . . . .

Gauche! Mi estas tute ĉagrenita de vi!

Mi ne havas tempon instrui al vi do-re-mi-fa-sol!

Gauche klinas sin.

*Direktisto*: (Prenante la stangeton,) Nun, de la komenco, ek'!

La Direktoro Sovaĝkato malfermas la pordon kaj eniras.

*Sovaĝkato*: Sinjoro Direktisto! Mi petas vin lasi



ĉi tiun ejon de la venonta semajno!

*Direktisto*: Ha? Lasi la ejon?

*Sovaĝkato*: Jes, ni ja decidis inviti Revu-orkestron de Tokio.

*Direktisto*: Sed sinjoro Direktoro, ni ja . . .

*Sovaĝkato*: Ĝi ne taŭgas ĉiuokaze, ĉar ĝi tute ne fariĝas interesa, kiom ajn vi ekzercus. Kaj cetere, inter viaj membroj oni ja trovas iun, ĉu 'ĉeliston, ĉu farunfariston ni ne scias!

La Sovaĝkato kaj la Jazisto malfermas la pordon kaj foriras ridegante: Ha' ha' ha' . . . .  
Ha' ha' ha' . . . !

Postlasitaj homoj, senvortaj pro ekfrapo de senkuraĝiĝo.

(25) En la kabano.

Gauche apogas sin sur la muro. La lampo estas lasita eĉ ne lumigite.  
En liaj okuloj brilas larmoj.

(26) Sub la planko de la kabano.

La Talpo kaj la Melo interparolas.

*Talpo*: Kio fariĝis ĉi-vespere? Ĉu li ankoraŭ ne komencas la *gũo' gũo'* . . . . ?

*Melo*: Mi ja venis speciale, vi komprenu, por ke

mia malvarmumo estu kuracita!

*Talpo*: Ankaŭ mia korpo ne statas bone ĉi-vespere.

(27) En la domo de la Sciuro.

En la domo de la Sciuroj en arbokavaĵo, ĉarma Sciuro-infano parolas al sia patrino.

*Sciuro-infano*: Panjo! Ne aŭdiĝas la sonoj de sinjoro Gauche, ĉi-vespere . . . .

*Sciuro-patrino*: Hm, certe — Eble, li ja ne estas ankoraŭ reveninta.

*Sciuro-infano*: Panjo . . . . Kantu ion por mi!

*Sciuro-patrino*: Kion do . . . . ?

*Sciuro-infano*: Ho, panjo, ĉu ne, tiun kanton, kiun vi ĉiam kantas?

La Patrino komencas kanti lulkanton.

„La Lulkanto de Nanbu“

*Nennero yae, korokoro!*

Certe ricevos vi post via dorm' ruĝan rizaĵon kun bongusta fiŝ'!

Se vi ne ŝatas ĝin, do, infanet', blankan rizaĵon kun dolĉega salm'!

(28) La vespera ĉielo.

La kanto disvastiĝas trankvile.



Bele briletas la steloj. Leviĝas la luno iom plilarĝa ol la antaŭa vespero.

(29) En la kabano.

Senbrue li levas sian kapon kaj atente aŭskultas la kanton. Baldaŭ li agordas la kordojn de la 'ĉelo.

Trankvile li komencas ludi la lulkanton.

(30) Sub la planko de la muelila kabano.

La Talpo kaj la Melo rigardas unu la alian kaj kapjesas.

Ili endormiĝas trankviliĝinte.

(31) Ekstere de la muelila kabano.

En la lumo de la luno vidiĝas la kabano, en kiu sola lumas lampo.

Sonas la 'ĉelo de Gauche.

(32) Ekstere.

Sur la branĉo dormas la Sciuro-patrino kaj -infano.

(33) En la kabano.

Li ludas la 'ĉelon trankvile.

Figuro de la Kukolo en la luna lumo ĉe la fenestro.

Li ludas plu rimarkante nenion.

*Kukolo* : Bonan vesperon, sinjoro Gauche!

La Kukolo sidas sur la lampo.

*Gauche* : Ha, estas vi, Kukolo!

*Kukolo* : Sinjoro Gauche! . . . . Mi petas instruon pri muziko.

*Gauche* : (Ridante,) Muziko? Ĉu ne, via muziko estas nur *kukko, kukko*?

*Kukolo* : Jes, estas tio. Tamen, tio ja estas tiel malfacila!

*Gauche* : Tio ne povas esti malfacila! Via estas penega, nur ĉar vi devas kanti multon. Kaj la maniero estas nenio malfacila.

*Kukolo* : Kaj tamen, tio ja estas penega. Ekzemple, jen mi kantas *kukko*, kaj jen *kukko*. Aŭskultante, certe vi ja rimarkus ke ili estas tiel malsamaj, ĉu ne?

*Gauche* : Ne, al mi ne malsamaj.

*Kukolo* : Do vi ne komprenas . . . . Por miaj kolegoj, se ni diras *kukko* dekmil fojojn, dekmilfoje ili estas ĉiuj malsamaj.

*Gauche* : Se vi jam tiel bone komprenas, do vi tute ne bezonus veni al mi!

*Kukolo* : Sed tamen, mi volas lerni precize la *do-re-*



*mi-fa-sol* nepre unu fojon antaŭ ol mi foriros al eksterlandoj. Sinjoro, bonvole instru al mi, mi petas.  
*Gauche*: Kiel vi ĝenas min! . . . . Do mi ludos al vi nur tri fojojn, kaj vi nepre hejmeniru!

*Kukolo*: (Klinas sin abrupte.)

*Gauche*: (*Volon' volon'*, li agordas la kordojn kaj ludas per la 'ĉelo: *do-re-mi-fa-sol-la-si-do*.)

*Kukolo*: (Rapidemege,) Ne, ne, ne tiel!

*Gauche*: Ho, kiel vi ĝenas min! Do vi provu mem kaj montru al mi!

*Kukolo*: Jen, tiamaniere! (Kurbigas la korpon antaŭen, preparas sian pozon dum momentoj kaj ekkrias:) *Kukko!*

*Gauche*: Kio? Ĉu tio estas via *do-re-mi-fa-sol*?  
Do, tute samaj estas por vi, ĉu ne, ĉu la Sesa Simfonio, aŭ ĉu *do-re-mi-fa-sol*?

*Kukolo*: Malsamaj ili ja estas!

*Gauche*: Kiamaniere do ili estas malsamaj?

*Kukolo*: Malfacile estas, ĉar ni havas ilin sinsekvantajn multope.

*Gauche*: Ĉu tiamaniere, post ĉio? . . . . (Ekprenas la 'ĉelon kaj ludas seninterrompe: *kukko-kukko-kukko*.)

La Kukolo ekĝojas kaj duonvoje komencas krei *kukko-kukko-kukko*. Tion ŝi krias tiel sindediĉe kun la korpo kurbigita, neniam haltante.

*Gauche* ludas absorbite. Ankaŭ ŝi krias absorbite. Ekdoloras la manoj al *Gauche*, kaj li ĉesas ludi.

Bedaŭrante ŝi krias *kuk-kukkuk*, kaj haltas.

*Kukolo*: Kio okazis al vi, sinjoro *Gauche* . . . .?

*Gauche*: Miaj manoj jam doloras al mi!

*Kukolo*: Mi petas al vi, bonvole ludu ankoraŭ unu fojon! Via ŝajnas bona, sed ankoraŭ troviĝas en ĝi io ne ĝusta.

*Gauche*: Kio? Ne mi petas vian instruon! Foriru . . . . jam nun!

*Kukolo*: Mi petas unu fojon ankoraŭ . . . . Mi petegas vin!

*Gauche*: Do, nur unu fojon, por la lasta.

*Kukolo*: (Ekspiras:) *Kuk!* (Kaj al *Gauche*,) Mi petas vin, plej longe, kiel eble.

*Gauche*: Kiel vi ja tedas min!

Li ridetas amare, kaj komencas ludi la 'ĉelon.

(34) Ekstere de la muelila kabano.

La luno lumas brile.

(35) Interne de la muelila kabano.

*Gauche*: (Ekhaltas subite.) Aj! Se mi daŭrigus tian sensencaĵon, mi ja fariĝus birdeto!



*Kukolo*: (Kun bedaŭro rigardas al *Gauche*.) Pro kio do? Ĉe ni, eĉ la plejmalkuraĝulo kriadas ĝis la sango ŝprucas el la gorgo.

*Gauche*: Kian impertinentaĵon mi aŭdas! Foriru tuj! Vidu! Ĉu ne, jam la tagiĝo! (Rigardas la krepuskon ekstere de la fenestro.)

*Kukolo*: Do, ĝis la suno leviĝos, mi petas vin. Ankoraŭ unu fojon . . . . sufiĉas nur mallonge. (Klinas la kapon.)

*Gauche*: Stulta birdaĉo! Se vi ne foriros, mi senplumigos vin kaj formanĝos por mia matenmanĝo! (Kun ekbruo li batas la plankon per la piedo.)

En la momento, konsternite, la *Kukolo* alflugas al la fenestro abrupte por elflugi. Ŝi puŝiĝas, tamen, kontraŭ la vitron forte per la kapo, kaj subite falas malsupren. Konfuzite *Gauche* provas malfermi la fenestron.

Dum li skuegas la fenestrokadron brukrake, subite la *Kukolo* alpuŝiĝas refoje, kaj falas malsupren. Falinte, ankoraŭfoje ŝi supren ekflugas kun ĉiuj fortoj el la tuta korpo.

Konfuzite, *Gauche* eklevas la piedon kaj ekbatas per ĝi la fenestron. Du, tri vitroj frakasigas kun terura bruo, kaj la fenestro falas eksteren kun la kadro.

(36) Ekstere de la muelila kabano.

Belega ĉielo matenruĝa. La *Kukolo* fugas al la arbaro, oblikve tranĉante la aeron.

(37) La arbaro.

La lumo de la matena suno fluas sur la arboj de la arbaro. Kantas la *Kukolo*. Nebulo fluas inter betuloj kaj abioj. Silentaj floroj tute malsekaj de roso.

—M. G.—

—H. G.—

(38) Scenejo de la kinejo.

Scenoj de la revuo.

(39) Sur la scenejbordo.

La *Sovaĝkato* kaj la *Jazisto* rigardas starante unu apud la alia.

*Sovaĝkato*: (Ridante,) Oni diras, ke la sinjoroj *Bethovenoj* enŝoviĝis fine en la stalon.

*Jazisto*: Estus pli bonvenigataj, se ili prefere ludus por la oreloj de la ĉevaloj!

La rido de ambaŭ kovras sur la muziko —



(40) En la stalo.

Arde superfluas la muziko de la Tria Ĉapitro de la Pastoralo. Estas ĝuste meze de la ekzercado.

La Direktisto ŝvitas. Lia fervora direktado, kun la kapo svingata kvazaŭ por ĵetrelevi la harojn falintajn sur la frunto.

La muzikistoj ankaŭ ŝvitas.

Ankaŭ la ĉevalo en angulo de la stalo streĉas la orelojn.

(41) Ekstere de la stalo.

Verdo de la arboj susure balanciĝantaj.

(42) En la stalo.

Kiam la muziko atingis la kulminon, la Direktisto forte batas la stablon. La muziko haltas.

*Direktisto:* Gauche! Mi ja estas tute embarasita de via 'ĉelo! En ĝi tute mankas la esprimo. Pro kio do via instrumento ne akordas intime kun la aliaj . . . . ?

Gauche klinas sin.

(43) En la muelila kabano.

Gauche sidas senmove en la lumo de la lampo,

kaj eĉ iomete ne movetas sin.

La voĉo de la Direktisto (daŭras kii) :

„Kaj plie, ŝajnas ke nur vi sola ĉiam iras post aliaj kun malstreĉaj ŝulaĉoj trenataj.“

Gauche rigardas siajn fuŝformajn ŝuojn.

*Frap' frap'*, iu frapas ĉe la pordo.

Li levas la kapon malbonhumore.

*Gauche:* Kiu estas?

La Melo eniras kun naive malatenta mieno.

*Gauche:* He, Melo! Ĉu vi konas, kio estas la mela supo?

*Melo:* (Surprizite,) Ej?

*Gauche:* La melan supon . . . . vi konas?

*Melo:* Mi ne konas ĝin.

*Gauche:* Do mi instruos al vi! La mela supo estas, aŭskultu bone, supo kun miksaĵo de mela viando kaj brasiko kaj salo boligita plentute . . . . , kion manĝas mi, sinjoro Gauche!

*Melo:* Ej? (Palpebrumas.)

*Gauche:* Kiel do? . . . . Vi ja ektimas, ĉu ne? . . . .

*Melo:* Sed mia patro diris al mi . . . . Sinjoro Gauche estas tre bonkora homo, kaj mi iru al vi kaj petu instruon.

*Gauche:* Pri kio peti mian instruon? Mi estas okupita!

*Melo:* Mia posteno estas tambureto. Li diris al mi,



ke mi petu vian instruon agordante al via 'ĉelo.

*Gauche*: Sed mi ja estas dormema.

*Melo*: (Elprenante la muziknoton kiun li kunportis sur sia dorso,) Ne diru tiamaniere, sed ludu por mi „La Gajan Kaleŝiston“, sinjoro *Gauche*!

*Gauche*: La Gajan Kaleŝiston?

Apud la titolo sur la muziknoto estas gaja desegnaĵo de melo sur kaleŝo.

*Gauche*: Hm! Ĝi ja ŝajnas stranga muziko! (Provludas per la 'ĉelo la komencan parton.)

*Melo*: (Elprenas du stangetojn de la dorso, kaj frapante la 'ĉelon sube de la ponteto,) Ĉu ne, estas ja interese!

La gaja muziko plaĉas al *Gauche*, kaj li ludas daŭre.

Ĝojoplena vizaĝo de *Gauche*, plenstreĉita *Melo*.

*Melo*: (Subite ĉesas frapadi.) Sinjoro *Gauche*!

*Gauche*: Kio?

*Melo*: Estas strange, ke vi ĉiam malfruiĝas kiam vi ludas sur la dua kordo. Mi ja preskaŭ faletas.

*Gauche*: Kion vi diras . . . .? Hm, tio ja povus esti.

*Melo*: (Kompateme ĉirkaŭrigardante kaj frapetante la 'ĉelon,) Estas strange . . . . Kie estas malorde . . . .? Ĉu vi ne ludos por mi ankoraŭ unu fojon?

*Gauche*: Volonte!

*Gauche* ekludas. Ekludas ankaŭ la *Melo*.

Li ludas per ĉiuj fortoj rigardante en la muziknoton.

(44) La muziknoto. (Fantazio)

La bildo de la kaleŝo apud la titolo ekmoviĝas.

(45) Kampa vojo. (Fantazio)

La kaleŝo kun *Gauche* kaj la *Melo* sur si kuras gaje en la hela lumo.

Al la monto, brukrakante tra la arbaro.

Ili kantas gaje laŭ la ritmo de la kaleŝo.

Subite ĝi ekskuiĝas forte kun krakbruo, la *Melo* ekfalas antaŭen kaj preskaŭ defalas de ĝi.

La muziko ĉesas, la kaleŝo haltas

(46) En la muelila kabano.

*Melo*: (Klinante la kapon,) Ankoraŭ same malfruiĝas la dua kordo . . . .

*Gauche* klinas la kapon malĝoje.

*Gauche*: (Ekĝemas,) Do, ĉu mi estas senespera post ĉio . . . .?

Sur la fenestraj vitroj ekfrapas grandaj pluvgutoj.



(47) Ekstere de la muelila kabano.

Vento komencas blovi forte. Folioj de arboj flugas.

(48) Sur la ĉielo.

Nigraj nuboj ŝveliĝas, kaj rapide kovras la ĉielon.

(49) Arboj tumultantaj en la vento.

Folioj ĵetas sin kirliĝante. La uragano ĉiumomente pli intensiĝas.

(50) Sur la ĉielo.

Arĝentaj rubandoj ekkuras disŝirante la nigrajn nubojn.

(51) En la muelila kabano.

Gauche kuŝas sur la lito kovrante sian tutan korpon per lankovrilo ĝis la kapo.

La uragano intensiĝas ĉiam pli.

Tre malfortaj frapsonoj ĉe la pordo dum intertempo de ventoblovoj.

Gauche restas ankoraŭ kaŝita en la litaĵo.

De la interspaco malsupre de la enireja pordo

ekmontras sian kapon la Muso-patrino.

*Muso-patrino* : Bonan vesperon ! . . . . Bonan vesperon !

Ĉar Gauche ne respondas, la Muso-patrino kaj la -infano eniras.

*Muso-patrino* : Ho, sinjoro ! Sinjoro Gauche ! Jen li havas ventrodoloron, kaj estas preskaŭ mortonta. Bonvole kuracu lin ! Elkore mi petas !

Gauche montras la kapon fine el la litaĵo.

*Gauche* : Kion vi diras ? Kiel mi ja kapablus kuracarton ?

*Muso-patrino* : Ne, vi mensogas. Tiel lerte vi kuracas ĉiutage !

*Gauche* : Mi tute ne komprenas, pri kio vi parolas !

*Muso-patrino* : Sed tamen, la malvarmumo de mia edzo de la lasta vintro, la neŭralgio de la Leporo kaj la reŭmatismo de la Talpo — ĉiuj estas kuracitaj dank' al vi.

*Gauche* : (Ŝovas sin eksteren iom post iom.) Tio estas ia miskompreno. Mi ja instruis muzikon al la Kukolo kaj la Melido. Sed nenion pri kuracado de malsanoj.

*Muso-patrino* : (Malĝoje,) Ho ve ! Se vi devas malsaniĝi post ĉio, kial ne prefere pli frue . . . . ? Almenaŭ dum sinjoro Gauche bonvolis ludi *gŭo'* *gŭo'* ĉiutage . . . . ?

*Muso-infano* : Ha, dolore, panjo !

*Muso-patrino* : (Ĉirkaŭbrakante la infanon,) Ho,



bone, bone! Kia malfeliĉa infano vi estas! . . . .

Ni ja venis ĉi tien speciale por peti al li, kaj tamen sole nur hodiaŭ li ne bonvolas ludi por ni . . . .

*Gauche*: (Levigante,) La malsanoj de Meloj kaj Musoj estas kuracitaj de mia 'ĉelo?

*Muso-patrino*: Jes, sinjoro. Ni nomas tion la Elektra masaĝo de sinjoro *Gauche*.

*Gauche*: Ha? Elektra masaĝo?

*Muso-patrino*: Ho jes, sinjoro *Gauche*!

*Gauche*: (Stariĝas de la lito.) Bone, bone, mi komprenas nun. Mi ludos por vi, se sufiĉos nur aŭdigi la sonon.

Ekprenas la 'ĉelon kaj sidas sur la seĝo.

*Muso-patrino*: (Metas unu kaŝtanglanon antaŭ li.)  
Elkore mi petas vin.

Li prenas la Infanon per la fingroj, kaj metas tra la truon en la internon de la 'ĉelo.

*Muso-patrino*: (Petegas lin surprizite,) Sinjoro, ĉu vi permesas min esti apude? Estas ja tiel, ĉe ĉiuj hospitaloj.

*Gauche*: Ho jes, laŭplaĉe!

Ŝi eksaltas kaj volas eniri tra la truon.

Sed ŝi estas tro malvasta por enlasi ŝin.

(52) Interne de la 'ĉelo.

La Muso-infano sidas bonkondute, tenante sin

rigide.

*Muso-patrino*: (Elmontras la kapon.) Ĉu vi falis kun la piedoj bone ordigitaj, kiel ĉiam mi instruis vin?

*Muso-infano*: Hm!

*Muso-patrino*: Mi ja ne povas eniri. Sidu kviete, kaj ne moviĝu!

*Muso-infano*: Jes, ja!

Eksonas la Rapsodio de *Gauche*.

La Infano abrupte reĝustigas la pozon.

La muziko fariĝas ĉiam pli intensa.

(53) Interne de la kabano.

*Gauche* ludas la 'ĉelon per ĉiuj fortoj.

La Patrino ŝajnas maltrankvila pro senpacienĉiĝo. Fine ŝi sursaltas sur la genuon de *Gauche*.

*Muso-patrino*: Jam sufiĉas, sinjoro! Bonvole eligu lin!

*Gauche*: Ĉu jam sufiĉas?

Li tenas la 'ĉelon transverse kaj metas la manon ĉe la truon. La Infano elmontras la vizaĝon de la truon, restas senmova dum momento, kaj falas planken.

La okuloj de *Gauche* kaj la Patrino rigardantaj la Infanon.

La Infano ne moviĝas. Baldaŭ li ekstremigas



sian korpon, ekpaŝas, kaj ĉirkaŭkuras vigle.

*Muso-patrino*: (Kun ĝojo,) Ho, li estas jam sana!

Mi dankas vin, sinjoro, elkore mi dankas vin!

(54) Ekstere de la kabano.

La vento jam ĉesis dum ili ne atentis, kaj la plena luno estas sur la ĉielo.

(55) Interne de la kabano.

La Muso-patrino plurfoje klinas la kapon kom-  
pleze antaŭ Gauche.

*Gauche*: Estas jam sufiĉe . . . . Nu, ĉu vi manĝos  
panon?

*Muso-patrino*: (Ŝajne konfuzite,) Ne, ne, tute ne-  
eble! Ni ŝuldas al vi tiel multe. Do, kiel ni povus  
veni por elporti el via ŝranko?

*Gauche*: Mi demandas ne tion. Mi demandas nur,  
ĉu vi manĝos!

*Muso-patrino*: (Kun mieno de nekomprene,) Jes  
. . . . ĝin ni ja . . . .

*Gauche*: (Prenante pecon da pano de la tablo,) Kun-  
prenu ĝin!

Kun surprizo kaj ĝojego la Muso-patrino pie  
altetenas la panon. La Infano ĉirkaŭkuras ĝoje  
kriante: Pano, pano!

*Gauche*: (Ridante,) Nu . . . . Reiru hejmen

senprokraste!

*Muso-patrino*: Jes, jes, sinjoro!

La Patrino iras al la pordo kune kun la Infano,  
kun la granda pano sub la brako.

Ili volas eliri tra la truo, tra kiu ili eniris.  
Sed ili ne povas eliri, ĉar la pano estas tro  
granda. La Patrino eliras unue, kaj la Infano  
puŝas la panon de malantaŭe per ĉiuj fortoj.

Gauche ridas vidante tion, stariĝas, iras al la  
pordo kaj malfermas ĝin.

(56) Ekstere de la kabano.

Ĉar la pordo malfermiĝis subite, la Muso-pat-  
rino ridetas iom hontete.

*Muso-patrino*: Vere, vi ja estas tiel kompleza zor-  
gante ĉion pri ni . . . .

La Infano kaj la Patrino levas la panon kun-  
labore, malsupreniras laŭ la deklivo preter la  
paŝoŝtono, kaj malaperas post la herboj.

(57) Interne de la ĉambro.

Gauche rigardas tien, kie la Musoj malaperis.  
Li ektrovas ĉe siaj piedoj la kaŝtanganon kiun  
lasis la Musoj.

Li ekprenas ĝin per la fingroj kaj sidiĝas sur la  
seĝo. Li metas ĝin sur la tablo, kaj rigardas



ĝin fikse.

*La voĉo de la Muso:* Dum ni aŭskultas al la sono kiun vi ludas, la cirkulado de la sango tra la tuta korpo fariĝas tiel bonorda, ke ni sentas nin tre agrabla.

*Gauche:* Ĉu la Meloj kaj la Musoj tiel ĝojas pro mia 'ĉelo . . . . ?

Li prenas la 'ĉelon ridetante, kaj komencas ludi.

Subite la ĉirkaŭo ŝanĝiĝas al varma koloro.

— M. —

(58) Komenciĝas la Kvara Ĉapitro.

La tero brilas hele sur la tuta ĉirkaŭo.

Fortikaj tritikoj. Belaj floroj florantaj en plena pompo.

La muelrado turnas sin trankvile.

(59) Ekstere de la kinematografia teatro.

Anonctabulo de la koncerto

„Beethoven: Pastoral Simfonio“

(60) La scenejo de la koncerto.

La Direktisto svingas la stangeton iom kontente, kun surprizo en la okuloj.

La kamero proksimiĝas al la 'ĉelo. La arĉo per kiu Gauche ludas plenstreĉe. Vibrantaj

kordoj. Lia piedo batanta la takton.

(61) Sur la scenejo.

Baldaŭ la Kvara Ĉapitro estas finludita.

Leviĝas intensa aplaŭdo.

La kamero retiriĝas malantaŭen — la Direktisto kaj la Muzikistoj staras kun klinitaj kapoj.

Senbrue la kurteno falas dum aplaŭdado.

(62) Sur la partero.

La Knabino aplaŭdas.

La Direktoro Sovaĝkato staras gape.

Post momento, aŭdante la aplaŭdon intense daŭrantan, li rigardas ĉirkaŭen malkviete.

(63) Sur la scenejo.

La kurteno jam malleviĝis, kaj tamen en la halo ankoraŭ sonas la aplaŭdo. Ne nur tiel, sed ĝi altiĝas pli kaj pli, kaj fariĝas sono eĉ strange minaca kaj neregebla. Dum tiu momento ili ĉiuj aŭskultas al la sono.

La Sovaĝkato envenas rapidemege preskaŭ stumblante.

*Sovaĝkato:* Bisajon oni postulas! Ludu ion, mi petas!



*Direktisto:* Mi estas embarasita . . . . Post tia grandiozaĵo . . . . Ha, jes, Gauche! Ĉu vi ne iros sur la scenejon kaj ludos ion?

*Gauche:* (Surprizite,) Mi?

*Direktisto:* Jes, vi! Via ĉelo estis brilega!  
Li puŝas lin en la mezon de la scenejo.

(64) La fronto de la scenejo.

La kurteno leviĝas duone. Vidiĝas la kruroj de Gauche kaj la Direktisto irantaj tien kaj reen.

La Direktisto retiras Gauche, kies kruroj iras al la scenejbordo. Pli laŭte la aplaŭdo kovras. Gauche estas devigita sidiĝi sur la seĝo en la mezo.

La kurteno leviĝas. Ankoraŭ daŭras la aplaŭdo. Li ne moviĝas.

(65) Sur la scenejo.

Rezolute li komencas ludi „La Tigroĉasadon en Hindio“.

(66) Ĉe la scenejbordo.

La Sovaĝkato, la Direktisto kaj la Muzikistoj fikse rigardantaj lin surprizite.

(67) La fenestro sur la plafono.

La animaloj fikse rigardantaj al li kortuŝite.

(68) Sur la scenejo.

Gauche daŭras ludi.

Baldaŭ li finludas.

Post momenta silento leviĝas arda aplaŭdado.

(69) La scenejo de la pupa teatro kaj la partero.

Trans Gauche sidanta senmove, infanoj-rigardantoj akklamantaj al li.

(70) Sur la scenejbordo.

*Direktisto:* (Aplaŭdante al li kortuŝite, kaj skuan-  
te la kapon,) Kiel li ja povis lertiĝi tiel rapide?

(71) Plena aspekto de la arbaro.

Superfluas la Kvara Ĉapitro de la Pastoral Simfonio. Ĉielarko staras sur la ĉielo hele serena, transe de malproksima montaro.

Aŭdiĝas la voĉo de la Kukolo. Gauche staras kaj aŭskultas kvazaŭ sekvante la voĉon.

— LA FINO —



セロひきのゴーシュ (エスペラント訳)

---

1955年8月20日印刷

1955年8月27日発行

¥70.

|     |       |
|-----|-------|
| 訳者  | 野島安太郎 |
| 発行者 | 宮本正男  |
| 印刷者 | 竹花稔一  |

発行所 日本<sup>エスペラント</sup>図書刊行会  
大阪市大淀区中津浜通2-20  
電話豊崎⑦2898番  
振替大阪 60436 番

---

Kansai Esperanta Presejo



# Filmoj pri Japano Vivo

haveblaj ĉe

## Mitui Arto-Produkcio

(Mitui Geizyutu Production)

Nihonbasi Muromati, Tyuuooku, Tokio

Kesto de Japanaj Ludiloj

Japanaj Pupoj

Japanaj Ĉarpentistoj

Japanaj Agrokulturaj Maŝinoj

Antikvaj Japanaj Skulptaĵoj

Kolosa Statuo de Budao en *Nara*

Belartoj en *Momoyama* Periodo

Mezepokaj Belartoj de Japanio

Japana Ceramika Arto

Historio de Japanaj Balenĉasistoj

Gauche la 'Ĉelisto\*

La Vivo de Japanaj Simioj

Laboristoj de Japanio

La Pinraŭpoj

Tutugamusi — *Scrutibus Mitus*

Naskiĝo de Santonino en Japanio

Nilono kaj la Vivo

Sangopremo kaj la Vivo

Patrinoj kiuj legas Librojn

(\*: 5 bobenoj; aliaj: 2 bob.)

*P e r a s*

## Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj

Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodo-ku, Osaka





**Książnica Podlaska**  
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



**KP-F14-0002684**

